Augustin Wibbelt,

La aŭtuno

tradukita de Manfred Retzlaff

Riĉulo estas la aŭtun'!
Kun korb' kaj sako venas ĝi,
Plenigas nian domon, ĝis
Plenplena estas tiu ĉi.

Surkampe kaj en la ĝarden'
Troveblas superflu',
Kaj ankaŭ la birdetoj jen
Malsatas nun ne plu.

Riĉulo estas la aŭtun'!
La arbojn farbas ĝi,
Kaj ore brilas ĉie jen
Nun ĉiu arb-foli'.

Kaj ĉion ĝi fordonas nun -
Senhava restas ĝi.
Bonega estas la aŭtun'!
Dankemaj estu ni![2]

Traduko de la Basgermana poemo "De Hiärfst" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2012-07-26.*

Arg-600-1210 (2012-09-26 14:08:21)

[2] aŭ:
Dankemaj estu ni!